

PREZO: 1.- Kr.

Starostoj: Stellan Engholm

1949

MALGRANDA REVUO

Nro 1 • 1949
7a JARO

ENHAVO:

	Pago
Akordo minora, de L. C. Deij	1
Notoj el etnografia panoptikono, de J. Kohen-Cedek	2
Kristeco en Germanujo, de Hellmut Otto	10
Ĉu la esperantistoj estas naivaj? de Einar Hult ...	13
La fabelo de la stela nokto	16
Dostojevskij kaj la moralo, de Stellan Engholm	17
Lingvaj sugestoj	20
Literaturo	24
Por diskuto	31

Redaktoro — Eldonanto:
STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 4 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23.

MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo", Neutorgasse 9, Wien I.
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeckstr. 3, Brusel W.
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).
Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki K3.
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.
Germanujo: Ing. Hellmut Otto, Bamlstr. 7, Berlin-Spandau.
„ Sro Oscar Büncmann, Isestr. 79 III, (24) Hamburg 13.
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.
Nederlando: Libroservo FLE, Roelantstr. 4, Amsterdam W.
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalema.
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sól.
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 18 St. New York 11.

MALGRANDA REVUO

Nro 1

7a JARO

1949

Akordo minora

De L. C. DEIJ

LA VAGINTO

Min pelis io, kion mi ne povas diri
— nomado eble povus ĝin imagi —
la febro loksopire ĉien vagi
kaj ĝin trovinte tuj al nova lok' sopiri.

Ho nostalgi', ho trovincita pensofonto!
vi pelis min ĝis laca vivofino
kun nevencb'la, vana vagobstino
renkonte al la retroira horizonto.

Sed ne pro tio nun timigas la obsedo:
la lok', al kiu mia kor' sopiris,
troviĝas eble - kie mi foriris:
naskiĝa lok', gepatra dom', infana kredo...

MEDITO

Kontente muĝtantaj arboj.
karesmurmura, pimpa*
river', transborde pacaj garboj
kaj ĉio bonfartige simpla;
vespere krepusko — apenaŭ bloveto,
senzona silento, senmova kvieto.

* Gaje alloga.

Ĉu tio faris min feliĉa
en mia infanaĝo?
Mi estas kontentige riĉa,
ne mankas al mi librosaĝo.
Sed kiam silente — mi ĉiam enuas!
Mi ne plu admiras ... mi ne plu genuas ...

ALAŬDO

Alaŭdo, via kant'! Mi povas aŭdi
ĝin, kompreni, senti, sed ne diri;
ĉar mi ne havas kion tiel laŭdi,
kion tiel ami kaj admiri.
Por via pur' mi donus poezion,
lutan homan lingvon, se vi petus;
por via sendemanda am' la scion
kaj komprenon vanaŭ mi forĵetus.

Notoj el etnografia panoptikono

De J. KOHEN-CEDEK (Jerusalem)

Tio ĉi okazis nokte en la mezo de julio 1948.

Eksonoris la redakcia telefono de la jerusalema ĉiutaga gazeto "Ĥejruth". La ĉefstabo komunikis: "Malĥa — konkerita." La redakcio vigliĝis pretigi la titolpaĝon:

"Post malfacilaj tritagaĵaj bataloj la araba vilaĝo Malĥa, grava surmonta strategia pozicio okcidentsude de Jerusalema, kontrolanta la malamikan trafikon, estas okupita de "ECEL"-kaj "LEĤI" trupoj."

Eble necesas klarigi, ke "Ecel" ("Nacia Milita organizacio") kaj "Leĥi" ("Batalantoj por Liberiĝo Israela" aŭ grupo de A. Stern) estas la du militistaj movadoj, kies partizana rezistado kaŭzis la britan forlason de Palestino; ambaŭ opoziciaj

al "Haganah" ("Sindefendo") — la nun oficiala armeo de Israelo. Kaj la gazeto "Ĥejruth" ("Liberiĝo") estas la centra presorgano de "Ecel".

Estis jam mateno, kiam venis la ĉefstaba aŭtomobilo por preni la militkorespondantojn kaj montri al ili la rezultojn de la lasta konkero.

Post kiam la ŝtaboficiro montris al ni la poziciojn kaj detale rakontis, kiel sekvis la bataloj, ni estis kondukataj al la komandanto, kiu esploris du militkaptitojn. Ili estis mezaltaj, nigroharaj lipharuloj kun rektliniaj vizaĝotrajtoj, lacaj kaj malsataj.

— Eksterregularmcaj batalantoj, memvole venintaj en kaptitecon — prezentis ilin la komandanto — sed ili hezitas sin aŭtentike identigi. Aspektas pli inteligentaj ol la kutimaj araboj.



Druzo el Supra Galileo

Turnante sin al la kaptitoj li demandas:

— Kiuj vi do estas? El kie?

La viroj silentis, suspekteme "palpante" nin per timplenaj okuloj.

— Al kiu gento vi apartenas? Al kiu religio?

Ili ŝtele interŝanĝis dubrigardojn kaj silentis.

— Sro komandanto — diris mi — mi havas supozon. Kristano ne kaŝus sian religion, islamano ĝin firme anoncus. Ili estas *druzoj*...

Aŭdinte la lastan vorton la viroj ekvigligis. Sekvis rapidparola vortotorento kun riĉa mangestado kaj reciprokaj interrompoj. Jes, ili estas druzoj, el Transjordanio, Ili intence dizertis, ĉar ili aŭdis, ke sur la juda flanko batalas la beduena tribo "Al-Lihjab" — amikoj de la galileaj druzoj. Tial ili venis. Ili deziras aliĝi kaj batali kontraŭ la sirianoj.

La komandanto miris:

Kion ili mistifikas? Mi transdonos ilin al "Haganah". Oni tie esploru iliajn fabelojn. Stranguloj! Ĉu la druzoj estas fidingaj? Kion ni scias pri ili? Verdire — nenion!

*

La tuta "Antaŭa" Azio kaj precipe Sirio kaj Palestino plene meritas la epiteton "etnologimuzeaj landoj". Kune kun la plej antikvaj monumentruinoj konserviĝis ĉi tie postrestuloj de praaĝ gentoj, kvazaŭ fantomaj ombroj de iam grandaj kaj potencaj popoloj. Ĉi tie vivas ankoraŭ kaj mizere vegetas strangaj misterplenaj etnaj grupoj. Al scienca esploristo tiuj ĉi regionoj povus ŝajni kiel vera etnografia panoptikono. Kaj la druzoj estas ne la lasta kuriozaĵo en ĝi.

Tiu arablingve parolanta gento restas ĝis nun misterplena enigmo, kies etna deveno, moroj kaj religio ne estas definitive esploritaj. Ili kaŝemeco kaj ilia obstina rifuzo konigi siajn sekretojn naskis multajn nekredindaĵojn kaj fabelojn, kiuj penetris en la esplormaterialon kaj nebuligis la ĝustan scion.

La druzoj loĝas sur la sudranda regiono de Sirio apud la transjordanian limo, regiono nomata "Gebbel a-Druz" ("Druza montaro" — la biblia "Ĥoran"). Ĝi estas lafkovrita vulkandevena montaro (la ĉefmonto Calmon 1.840 m alta) kun intermontaj valetoj. Tie kolektiĝis la druzoj dum la lastaj jarcentoj, forpuŝitaj el la ceteraj regionoj de Sirio kaj el Libano. Ili mizere vivas okupiĝante pri neintensa terkulturo (tritiko), brutbredado kaj manmectioj.

En ilia citadelregiono en Gebbel a-Druz loĝas la plejmulto de la gento, preskaŭ 120.000, en la ĉefurbeto Suvejda 7.000, dum unu dekmilo loĝas en kelkaj vilaĝoj en Supra Galileo, en

Palestino, kaj po kelkaj miloj en Libano, Sirio kaj Transjordanio.

Kiuj ili estas?

La berlina antropologo F. Luschan konstatis, sur la bazo de siaj kraniaj mezuroj, ke la druzoj posedas nenion komunan kun la araba raso. Li asertis, ke ili, same kiel kelkaj aliaj gentsplitoj de Mezoriento (kiel ekz. Nucairoj, Metaviloj k. a.) laŭ iliaj fortikaj, altaj sed mallongaj kraniaj kaj laŭ iliaj longaj, mallargaj nazoj estas plej verŝajne praidoj de la antikvaj Ĥetidoj. Alia esploristo, la usona profesoro J. Ĥitti, opinias, ke la druzoj estas mikspopolo, konsistanta el persaj, Ĥaldeaj kaj arabaj gentelementoj.

*

Ĝenerale, en tiu ĉi mondparto la religiaj kaj naciaj grupigoj tre ofte identiĝas, kaj la religio kondiĉigas la nacian konscion. Kvankam la druzaj gvidantaj rondoj parolas pri druza nacieco, la simpla popola apartiĝas laŭ religia principo.

La religiaj konvinkoj de tiu sekto enhavas la dogmon pri la t. n. "*Takia*", laŭ kiu ili ĝis la venonta Revelacio travivas "Periodon de Sekreto" kaj devas konservi sian Instruon en plena kaŝiteco de nekredantoj. Sed la venonta alveno de Mesio alportos al ilia Instruo tutmondan aprobon, gloran superecon kaj mondposedon al la verkredantoj. Ĝuste tiu Takia allogis la scivolemon de la vojaĝintoj kaj esploristoj, de rabbi Binjamin el Todela (XIIa jc.) — la unua priskribanto de la druzoj — ĝis la plej lastaj raportistoj. Sed la plejmulto da pridruzaĵraportadoj evidentiĝis fantaziplenaj.

Laŭ tio, kion oni povas prijuĝi, la religia instruo de la druzoj konsistas el stranga "kvodlibeto" de ekstremŝiitaj islamaj dogmoj, judaj kaj kristanaj doktrinoj, intermiksitaĵoj kun gnostikaj zoroastraj misteroj kaj plej antikvaj idolanaj ritoj.

La ŝiita islamo havas sian centron en Persujo kaj Mesopotamio. Rilate al la pli disvastigita sunisma islamo, la ŝiitismo estas skismo bazita sur politikreligiaj cirkonstancoj de la VIIa jarcento, kiam post la tragika mortigo de la kvara kalifo, Ali (661; la bofilo de Mahometo, kies filinon Fatima li edzinigis al si) komenciĝis la internaj militoj pri la kalifeco-heredo, kaj liaj du filoj Hasan kaj Ĥusejn falis (la lasta dum batalo ĉe

Kerbela 680). La ŝiitoj opinias Ĥusejn sankta martiro kaj Ali Dia enkorpiĝo. Ili tre mistika religikoncepto destinis al Ali dekdu postajn reenkorpiĝojn (imamoj), el kiuj la lasta (Mahdio) estas la Mesia mondsavanto.

El la ŝiitisma skismo naskiĝis novaj herezoj. Kelkaj el ili atingis ĝis la randlimo de islamo, kiel tiu de Nucairoj en Sirio kaj de Ismaelidoj en Hindujo. La lasta herco estas fondita de imamo Ismael (mortis en Medino 760). Ĝi estas ŝiitismo kondukita al rando de ekstremo. La ismaelismo siavice naskis la druzan religion, kiu jam troviĝas sur la transa flanko de islamo.

Kiel ĝi formiĝis?

La sesa fatimida kalifo en Egiptujo estis Abu-Ali el-Ĥakim li-Amar-Allah (985—1021), kiu de 996 superregis ankaŭ Palestinon kaj Libanon. Li kaŝe estis ŝiito. Kiel ekzaltita fanatikulo li permesis al si multajn kruelaĵojn kaj ekstravagancojn, estante konvinkita, ke li estas la reenkorpiĝita Ali. Interalie li ordonis perforte islamigi ĉiujn judojn kaj kristanojn en Egiptujo, minacante la nekredantojn per kompleta elpelo. Lia konduto elvokis ribelon, kaj iun nokton li malaperis, kaj liaj spuroj restis netrovitaj.

La perso Ĥamza ibn-Ali ibn-Mahmad al-Hadi servis kiel veziro ĉe la kortego de kalifo el-Ĥakim. En 1017 li enkondukis en la kortegon sian disĉiplon Muĥamad ibn-Ismael el-Darazi. Estis tiu, kiu alportis al la kalifo la revelacion pri lia reenkarnejo kaj kiu proklamis lin "Mahdio". Tiu ŝiita "provoko" kaŭzis ribelagiton kaj Ĥamza kun el-Darazi devis forkuri el Kairo. En la valo Vadi el-Taim inter la libana kaj la Ĥermona montoĉenoj ili trovis sekretan ismaelidan sekton. Inter tiuj sektanoj ili anoncis la divorton de sia mahdio — la kalifo el-Ĥakim (poste "mistikplene ĉielnirinta"). La adeptoj de la nova kredo nomis sin "druzoj" laŭ la nomo de la apostolo el-Darazi. Baldaŭ aperis principaj diferencoj inter la du apostoloj, kaj el-Darazi devis forkuri. Kiel lian anstataŭulon Ĥamza elektis Baha ed-Din. Sekve de tiu disputo formiĝis du sektoj en la kadro de la nova religio: Ĥamzanoj kaj darazianoj. Post sia morto ankaŭ Ĥamza estis di-adorata de siaj sektanoj.

La fundamenta doktrino de druzismo estas la kredo pri reenkarnejo. Laŭ ĝi ĉiĉs animo post la korpa morto transiros vicon da postaj reenkarnejoj survoje al plia perfektejo, ĝis la fina plenumo de ĝiaj teraj taskoj kaj ĉielaj vivmisioj. La kalifo el-Ĥakim estis reenkarnejo, dispirita Ali, kiu dum la pasinta tervivo ne anoncis sin. Ĉiuj ŝajnaj "frencaĵoj" kaj kruelagoj de el-Ĥakim estas konsiderataj kiel simbolfaroj, enhavantaj profundan mistikan signifon.

El la juda kabalistiko ĉerpis la druzoj la instruojn de la konceptoj pri "s'firah". Laŭ ĝi ekzistas kvin (en Kabalo dek) laŭgradaj ŝtupoj en la terviva (en Kabalo ankaŭ en la postmorta) homanima leviĝo, survoje al fina perfektejo: saĝeco, animriĉeco, favoro, sindonemo kaj altrangeo. Ĉiu el la kvin korteganoj-kunuloj de el-Ĥakim modele simbolas unu certan gradon, kiun li atingis.

La druzoj popolamaso tre malmulte scias pri siaj religiaj dogmoj. La instruojn oni laŭŝtipe enkondukas en ĉiujn misterojn, kaj ĉiu sekvanta scirango estas akirebla post plenumo de certaj fastoj kaj komplikaj ceremonioj. La religia aŭtoritato apartenas al la t. n. "ukka" (klerulo) kaj la socia al la vilaĝa ŝefo.

La druzoj religimoralo predikas veremon, recipokan sendependon, batalon kontraŭ Satano — la malbonon portanta spirito — kaj konscian konvinkon pri Dia kaj homara unueco. La druzoj de Palestino estas adeptoj de Ĥamza, dum tiuj de Ĥoran estas disĉiploj de el-Darazi. Ili vivas monogamie kaj estas severaj puritanoj rilate al ĉasteco. Ili posedas altan senton de liberamo, sendependeco kaj justeco. Tamen la porparenca revenĝo estas ĉe ili laŭleĝe rajtigita.

Se la druzoj klerstato estas ĝenerale malaltnivela, ĝi tamen superas tiun de la ĉirkaŭantaj araboj, precipe rilate al la klerco de virinoj. Tiuj estas socie pli rajtohavaj kompare kun islamaj virinoj. La druzoj superas siajn najbarojn ankaŭ rilate al terkulturaj rimedoj kaj ĝenerala vivnivelo.

La historia rolo de la druzoj en Antaŭa Azio ne ĉiam estis malgrava. En la XVIIa jc. ilia emiro Faĥr a-Din konkeris preskaŭ tutan Sirion kaj Transjordanion. Lia soci-religia ten-

denco estis proksimigi la druzojn al la kristana mondo. En la komenco de la XIXa je. venkis la kontraŭa direkto — la orientiĝo al islamo, kies fervora simpatianto estis ilia emiro Baŝir. La turka regnestro eluzis lin, provokante druzo-kristanajn malpacojn (1840—1860), kiuj finiĝis per kruelega amasa elbudo de kristanoj en Libanlando. Ĝis nun oni tie memoras kiel fiaĵon la senindulgan mortigadon de infanoj, virinoj kaj maljunuloj en Dir al-Kamar.

Anglujo, interesita en la potenco de la turka imperio, prenis neŭtralan pozicion. Sed intermiksiĝis Francujo, la tradicia defendanto de la mezorientaj kristanoj. Malavaran monan subtenon al la suferintoj sendis la juda londona bankisto Sir M. Montefiore. Konstantinopolo cedis. La hegemonio de la kristanoj en Libano estis konfirmata, kaj la druzoj komencis elmigri de tie al la Ĥorana montaro.

En la jaroj 1879—96 militis la Ĥorana druzoj kontraŭ la turka superreĝo, sed ili estis venkataj. Ili devis pagi tributon al la sultano sed konservis sian internan aŭtonomion. Ĝin ili sukcesis konservi eĉ post la "junturka revolucio" (1908), spite al la politikaj intencoj de tiu partio "otomanigi" ĉiujn popolojn de la disfalinta Turka imperio.

En 1925, dum la franca superreĝo en Sirio, la druzoj, incitaj kaj armitaj de la anglaj fipolitikuloj en Palestino, ekribelis, postulante plenan memstarecon. La franca fremdullegio dronigis la ribelon en sangotorentoj, kaj la druza "sultano", la paŝao Al-Atraŝ, devis forkuri kun dek milo da batalintoj al Transjordanio, kie ili restis sub protekto de la tica emiro, ĝis la plejmulto de la forkurintoj post amnestio povis reiri hejmen.

La nuna konstitucio de la sendependa Sirio ne konfirmis la druzan teritorian aŭtonomion. Sed fakte neniu damaska regnestro kuraĝas veni al Suvejda por postuli impostpagojn, post kiam la foje senditaj oficistoj estis hontceremonie elpelataj de tie (1946). Fakte Ĝebbel a-Druz ne okazas al la decidoj de la komunsiria regnestro. Antaŭ jaro la druza "problemo" estis metita sur la tagordon de parlamentaj debatoj en Damasko sed estis kun skandalo forprenita, kiam la druza reprezentanto dum la kunsido pafis per revolvero je la flanko de

sia kontraŭulo. De tiam restis la neklara stato de ŝajna subigo de Ĝebbel a-Druz al la siria regnestro dum fakta arbitra aŭtokrateco de la druzaj ŝeĵkoj en Suvejda.

*

En la fino de julio estis en Palestino enkondukata la t. n. "dua interpaco" de Folke Bernadotte. La duone sieĝita Jerusalemo ricevis tiam la israelan gazetaron aperintan en Tel-Aviv. La plej multe traktitaj temoj estis a) la interkonsenta kunfandiĝo de "Eccel", "Lefi" kaj "Haganah" en unuigitan israelan armeon kaj b) partopreno de la galileaj ĉerkesoj (kaŭkaza gento) kun la beduenoj de "Al-Liĥjab" en la milito sur la juda flanko.

Sur la strato mi renkontis la oficiron el Malĥa.

— Jes — diris li — la rakonto de la du militkaptitoj ne estis elpensajo. Verŝajne oni povas kredi al druzoj. Ili estas fidindaj...

Augusto 1948.



"Talkha", druza vilaĝo en Supra Galileo

Kristeco en Germanujo

De HELLMUT OTTO

"Ĉar Dio donis la spiriton ne de malkuraĝeco, sed de potenco kaj amo kaj sinregado."

II Tim. 1: 7.

Iuj demandas: "Ĉu ankoraŭ vivas en Germanujo kristanoj, en la lando, kiu ekflamigis la duan mondmiliton kaj nun kuŝas funde disbatita kaj vivaĉas sub la kontrolo de la venkintoj?"

La respondo estas: "Jes, ankaŭ en Germanujo ekzistas ankoraŭ kristanoj, verŝajne eĉ pli da seriozaj kristanoj ol iam antaŭe. Precipe estas ĉie rimarkebla forta penado por vera kristeco, kiu vidas sian taskon ne nur en la sciigo de la krista instruo sed precipe en helpanta farado."

Estu nun komunikataj pensoj kaj spirito, kiuj plenigas kaj movas nuntempe ĉiun honestan kristanon en Germanujo.

Mizeraj tempoj estas instruaj tempoj. Ili montras senkomplete la erarvojon, la mankojn kaj la kulpon. Ili montras, ke ni vivis malĝuste, precipe ke nia vivo estis malkrista — kaj ne nur ĉe ni en Germanujo sed ankaŭ en aliaj landoj. La tuta mizero, sufro kaj malfeliĉo estas kvazaŭ memkulpiĝoj pro malobeo kontraŭ la diaj ordonoj.

La dua mondmilito kaj ĝia tragika fino estis por multaj germanoj la plej granda trompiĝo de ilia tuta vivo. Estis falsa profeto, al kiu ili honkredeme konfidis sin, kaj kiu kondukis ilin en la abismon. Ili kredis je la bono de lia volo kaj trompiĝis tiel terure. Tiel estas kompreneble, ke nuntempe pli da homoj ol iam antaŭe ne kredas je daŭra plibonigo de la ĝenerala situacio per la diversaj partioj.

Sed kio kaj kiu povos alporti savon kaj resaniĝon por la tuta lando?

Ĉi tie estu redonata eldiro en la evangelia berlina gazeto "Kirche" (Eklezio) de la berlina evangelia episkopo dro Dibelius post lia vojaĝo al Usono:

"La nova ŝtatformo, kiun ni bezonas, se la homaro ne pereu en maro da sango kaj larmoj, povas naskiĝi nek en Rusujo nek en Usono. Ĝi devas veni el Germanujo mem, kiu ekstere estas

tute disbatita sed interne havas novan sopiron agi serioze laŭ la evangelio."

Tio signifas, ke nur vera praktika kristeco povas alporti daŭran plibonigon al la homoj, la lando kaj la mondo. Ĉar en iu komuna aro, en kiu unu amas la alian kiel sin mem, ne povas ekzisti maljusto kaj malhumaneco. Tial en multaj homoj kristaliĝis el la amaraj spertoj de la lastaj jaroj tiu ekkono, ke la krista kredo estas plej bona bazo de daŭra pli bona komuna vivo.

Sed la germana homo fariĝis sentema — li scias diferencigi inter vera kaj falsa kristeco. Kiom utilas ĉiuj belaj vortoj, se mankas la faro, la bonaj agoj, kiuj solaj pruvas la veran kredon? Nur la helpema farado montras la veran kristanon. Per nuraj paroladoj la eklezio iam malsukcesis, kuniris ĝi en la militojn kaj en la mizeron. Ne mirinde, ke la popolo forturnis sin de tiuj hipokrituloj.

Tial la kristeco kaj la eklezio povos estonte ekzisti, nur se ili renoviĝos per la spirito de la pura evangelio de Jesuo Kristo. Kaj tiu renoviĝo, tiu klopodado al vera praktika kristeco estas ĉie rimarkebla.

Laŭ tiu senco mi trovis publike afiŝitaj en la "Evangelia Johano-fondaĵo" en Berlin—Spandaŭ, unu el la plej malnovaj ĉefcentroj de helpema frateco, la sekvantajn vortojn el la epistolo de Jakobo:

"Kia estas la profito, miaj fratoj, se iu diras, ke li havas fidon, sed ne havas farojn? Ĉu tiu fido povas lin savi? Se frato aŭ fratino estas nuda kaj sen ĉiutaga manĝo, kaj iu el vi diras al ili: Iru en paco, estu varmaj kaj sataj; tamen vi ne donas al ili tion, kion la korpo bezonas, kia estas la profito? Tiel same fido, ne havante farojn, estas en si mem malviva."

Tiel oni klopodas havi la religion ne nur por la dimanĉoj sed por ĉiuj tagoj. La religio devas trapenetri la tutan vivon kaj devas ĉiutempe nin gvidi, alie ĝi ne havas la ĝustan sencon. Dimanĉa religio estas nur duonaĵo, ŝajno, eksteraĵo, se ĝi ne etendiĝas al ĉiuj tagoj kaj plenigas la tutan homon kaj lian vivon.

Idealo efektiviĝu — la bela revo pri la dia regno sur la tero fariĝu fakto. Kaj tiu regno jam estas tie, kie regas la amo,

kie la frata, helpema amo gvidas la agadon. Tiu amo estas la plej bona signo de vera kristeco, kaj ĉiu vera kristano penas pleniĝi la tutan tagon per tiu amo. Li lasas sin gvidi de tiu amo same en la propra hejmo kiel en sia laborejo. Ĝi estu sentebla de la simpla taga vivo ĝis en la rilatoj inter la popoloj.

Kaj kiom da amo, kiom da helpema agado estas ĉie necesa en tiu ĉi terura tempo kun ĝia subpremanta homa mizero, kiun postlasis la kruela milito!

"Neniam ni sufiĉe amis!" diris konata kristano. Kaj nur kun tiu ĉiun kaj ĉion ĉirkaŭprenanta amo ni povos venki la grandegan mizeron. Ne senaga rigardado, ne pasiva atendo je la okazado de la sorto povos nin savi, sed sole agado laŭ Dio — agema amo.

Kaj tiu amo, kiu montriĝis plej bele en Jesuo Kristo, estas la viva ĉecsto de Dio sur la tero. El tiu eterna, neelĉerpbla dia prafonto ĉerpas la kristano. Pleniĝite de granda, silenta ĝojo li ne laciĝas en la klopodado por ĉiam denove venki sin mem kun siaj malfortoj kaj por agi pli kaj pli bone kaj bele kiel konfida adepto de Jesuo Kristo kaj fidela servanto de Dio.

Tiel pli kaj pli da homoj ekkonas, ke malkrista vivo pli malpli frue direktas nin al mizero kaj sufero, same en la homo mem kiel ankaŭ en la popola vivo, kaj ke nur la pardonanta kaj helpanta amo atingas daŭran feliĉan vivon, ĉar kie estas amo, tie estas ankaŭ ĝojo, paco kaj difavoro.

Ĉu la homaro ne devas lerni aniĝi al tiuj, por kiuj estas vivoleĝo porti unu la alian, pardonu unua la alian, helpi unu la alian?

Tiel ekvivas la kristeco en la nuna Germanujo novan reformon, renoviĝon al vera praktika kristeco, la religio de la granda helpema amo, en kiu ĉiuj homoj vivas sub Dio kiel fratoj sub ilia patro, kaj en kiu efektiviĝu la evangelio:

"Gloro al Dio en la supera alto,
kaj sur la tero paco,
inter homoj difavoro."

*

Voko al la mondo

de la berlinaj esperantistoj 15. 12. 48

La tuta ter' rigardas al Berlino,
la tranĉopunkto de la vasta mondo,
ĝi ŝajnas esti kvazaŭ je la fino,
sed tamen estas forta paca ponto.

En tiu turmentita urbo nia,
terure disbatita per milito,
amare dividita de alia —
ĉi tie ni laboras kun konfido.

Ni kredas je pli bona vivestonto,
en kiu vivos frate la popoloj,
kaj Esperanto, nia forta ponto,
nun ligu ĉiujn bonajn homajn volojn.

Kaj malgraŭ malfacilaj cirkonstancoj
neniam estu ni en morta laco,
kaj kun vi, fratoj vi, en ĉiuj landoj
laboru ni por vera homa paco.

Hellmut Otto.

Ĉu la esperantistoj estas naivaj?

De EINAR HULT

En numero 4/48 de Malgranda Revuo nia estimata amiko Stellan Rnholm skribis artikolon sub la titolo "Sigelmarkoj kaj mondpaco". Ŝajnas al mi, ke li iom ironias pri la sinteno de la esperantistoj. Precipe pri citita esperantisto, kiu rekomendis al la legantoj de anonco aĉeti liajn esperantokorojn (sigelmarkojn) kaj tiel kontribui por savi la homaron de nova mondmilito.

Rnholm skribas, ke se la anoncanto mem ne esperis krei mondpacon per tiu metodo, li tamen sciis, ke troviĝas homoj, kiuj kredas tion farebla. Ne malgranda parto de la esperanta agado estas reklamo por kaj kredo al la potenco de esperantaj koroj de iu aŭ alia speco.

Jam por ekokupi sin pri esperanto — oni devas havi iom da sopiro al kaj entuziasmo por iu granda celo, nebula aŭ pli malpli klara, por kies atingo esperanto prezentas sin kiel mirakla helpilo. Kiam oni lernas la lingvon kaj konatiĝas kun la pen-

sado kaj revado en esperantaj skribaĵoj oni ankau fariĝas samideano, plena de entuziasmo por la mondmisia signifo de la pacokrea lingvo. (Ke homoj fariĝas esperantistoj sole por praktike uzi la lingvon ja povas okazi, sed certe tio estas malofita afero).

Sendube nia amiko Engholm pravas en sia pentrado de la esperantistaro, ĉar verŝajne la plimulto de la esperantistoj ĝuste estas tiaj personoj, kiuj en esperanto vidas la mistikan helpilon, kiu povas kontribui por pacigi kaj unuigi la tutan homaron. Sed ĉu ni pro tio nomu ilin naivaj? Laŭ mia opinio la esperantistoj ne estas pli grandaj naivuloj ol la ceteraj idealistoj, kiuj kredas je la realiĝo de siaj idealoj.

Per esperanto ili celas unuigi la homaron lingve kaj tiamaniere krei tre gravan premison por forigi multajn miskomprenojn inter la diversaj popoloj. Jes, mi nun pensas ne nur pri la lingvaj miskomprenoj, sed pri la aliaj, kiuj vere kaŭzas la militojn! Kelkfoje la granda entuziasmo de certa tipo de esperantistoj igas ilin elpensi ĉe ridindajn helpilojn por vekii la intereson de la publiko, sed ĉu ni vere kritiku ilin? Ĉu la oculo ne sanktigas la rimedojn? Pluraj vojoj ja kondukas al Romo kaj eble la "ridindaj" esperantokoroj vekas la intereson kaj entuziasmon de iu...!

Persone mi admiras la entuziasmulojn pro ilia inventemo, kiu bedaŭrinde tro malofite donas la deziratan rezulton. Kaj kial? Jes, ĉu la kialo ne estas, ke niaj entuziasmuloj turnas sian aktivecon al la malĝusta publiko? Kial ne turni sin al la laboro vekii la neesperantistojn?

Aliloke en sia artikolo Engholm starigas la demandon: "Kion kredi, se montriĝis malprava la kredo al la pacokrea povo de esperanto?" Jes, kio okazos? Engholm skribas mem la respondon, ĉar ie li diras: "Esperanto ne povas krei pacon, nek steloj nek sigelmorkoj. Tion komprenas ĉiu homo, kiu povas almenaŭ iomete pensi. Paco kaj aliaj rilatoj inter la homoj dependas de la spirita stato de la homoj mem, de la efektiva spirita stato sed ne de okaze flagranta entuziasmo. Grandajn komunajn celojn oni atingas ne per ia popolmigra marŝado rekte en la feliĉoregion sed per ideofidela vivo kaj devoplenumo de ĉiu unuopa homo en lia propra loko."

Sendube la militoj dependas de la spirita stato de la homoj mem, tio estas fakto, kiu tamen povas ŝanĝiĝi! Kial? Jes, per edukado! Kaj por eduki kaj edifi la homojn esperanto ankoraŭ ludas modestan sed tamen gravan rolon. Estante esperantistoj ni montras nian emon partopreni la kreadon de pli feliĉa kaj paca mondo. Ke la marŝado al tiu fabelolando iras tre malrapide, je tio la esperantistoj mem kulpas. Kial? Ĉu ili vere ne faras ĉion eblan por prosperigi la lingvon kaj ties movadon?

Certe troviĝas multaj esperantistoj, kiuj modele kaj celkonscie laboras por la lingvo, sed ilia nombro ne estas sufiĉa. La plimulto de la esperantistaro estas tiaj personoj, kiuj restas pasivaj, kiam temas pri ia krudlaboro. Jes, multaj nur lernis la lingvon por havi ian "ŝatokupon" kaj tute ne emas partopreni la pli malfacilan kaj sendankan laboron varbi kaj instrui eventualajn adeptojn. Mi estas certa pri tio, ke la nombro de esperantistoj fulmorapide kreskus, se ĉiuj organizitaj esperantistoj agilus kaj varbus adeptojn.

Jam post kelkaj jaroj la nombro de esperantistoj en tia okazo duobliĝus. Mi ne skribas post kelkaj semajnoj aŭ monatoj, ĉar mi mem ne apartenas al tiu kategorio de esperantistoj, kiu per trompo volas logi la homojn lerni la lingvon! Esperanto estas facila lingvo, sed ne eblas lerni ĝin en kelkaj horoj. Fervoraj studoj kaj multa praktiko estas necesaj por majstri ĝin! Ĉu ni ne povas konstati tion en niaj grupkunvenoj, konferencoj kaj eĉ kongresoj? Ascertante la malon ni ridindigas nin!

Engholm ne multe kredas je la ebleco, ke homoj fariĝas esperantistoj sole por praktike uzi la lingvon. Mi ja ne povas paroli en la nomo de aliaj esperantistoj, sed tion mi almenaŭ scias, ke mi mem eklernis ĝin ne pro ĝia "interna ideo" sed egoiste studis ĝin por havi iun rimedon kontaktiĝi kun homoj, kiuj parolas fremdan nacian lingvon. Nur poste mi estis atakata de la citita malsano, pro kiu oni volas rigardi la mondon tra idealistaj okulvitroj. Ke la nuna mondo ne estas ia idealmondo... Jes, tion ni ja ĉiuj konscias sed ĉu ni lasu la revojn? Kaj ĉu ne lasu eĉ la "esperantokorojn"?

Ne gravas, se la sobraj personoj rigardas nin naivuloj, ĉar ni tamen laboras por iu alta idealo, kiu en pli malpli proksima estonteco realiĝos! Verŝajne la estonta generacio estos pli racia

kaj praktika ol la nuna, kaj tial la laboro de ĉiuj unuopuloj ne estis vana, ĉe se ilia laboro konsistis nur el la eltrovado de iu nova speco de esperantokoro! Malgraŭ ĉiuj malsukcesoj la lingvo iam ekokupos lokon en la suno, kaj tiam la naivuloj turnos la ridon sur sian flankon!

Kvankam nia amiko Engholm, pli ol ni ceteraj naivuloj, konscias pri la malfacilaĵoj, kiuj stariĝas sur la vojo al la revita paradizo, li tamen entuziasmige klarigas: "Se ni estas anoj de la plej alta kaj bona homa klopodado, ni ne forlasas nian klopodadon pro tio, ke la spirita konstitucio de la plimulto de la homoj ŝajnas nevenkeble kontraŭstara."

Guste tiel agu ni ĉiuj, kiuj pro iu motivo konatiĝis kun la bela celo de esperanto. La malvenkoj ne malfortigu nian entuziasmon, sed male spronu nin al nova klopodado por atingi la mondon de la naivuloj!

La fabelo de la stela nokto

Vintra stelnokto. Kreviga frosto. Miloj da steloj briladas el la nigra, nemezurebla universo.

La vivo pulsas tie, en malproksimo de miljardoj da miriametroj.

La vivo pulsas ĉi tie, sur nia mizera, malgranda planedo.

Kio estas la vivo tie?

Kio estas la vivo ĉi tie?

Formo, movado, materio, intelekto.

La *Formo* naskiĝas — disigiĝas — naskiĝas — disigiĝas — kaj fariĝas ĉiam pli komplikita strukture.

La *Movado* akceptas formon — fuĝas de ĝi — akceptas formon — fuĝas de ĝi — kaj aperas denove pli mirinda, pli vasta, pli brila.

La astroj radiadas sian substancon en la universon. Ie la radiado formas elektronojn, protonojn, atomojn, transformiĝas en elementnebulon kaj denove en astron.

Ĉio, kio malaperas, naskiĝas denove: astro, homo, praestaĵo; pli vasta, pli komplikita, pli brila. Tiel aperis la mondo — kiel stelo, homo, praestaĵo.

Sed kio estas tio, kio montriĝas en la aperintaj substanco kaj vivo, en la senĉesa ludo de formoj kaj moviĝo? — *Iu, Absoluto, Sola realo, Ĉi, Senfina kaj eterna kaŭzo.*

Oni diras, ke ni nenion scias pri tio.

Sed tamen ni ion scias: *Ĉi estas ĉie.*

La vintra stelnokto estas *Ĉi*. La nigra, nemezurebla universo estas *Ĉi*. Sennombraj astroj estas *Ĉi*. La homo estas *Ĉi*. La praestaĵo estas *Ĉi*.

A. K., Tampere.

Dostojevskij kaj la moralo

De STELLAN ENGHOLM

Moralo estas pli frue traktita en MR. Mi iom timas, ke mi tedos la legantojn per nova artikoleto. Tamen:

Profesoro skribas en revuo: "De kie tiu emo de la homo prezenti sin peka, senhelpa, subulo de pli alta potenco, de fremda aŭtoritato? . . . Li ankoraŭ estas parte infananimo, parte sklavanimo. Li rifuzas leviĝi de sia kaŭra pozicio, rektigi sin kaj mem decidi, kio estas bona kaj malbona. — Konata eldiro de Dostojevskij estas: 'Se Dio ne ekzistas, ĉio estas permesita.' Jen la sklavanimo! Se la sklavestro kun sia vipo ne staras super ni en la ĝardeno aŭ la caro de la animoj, regante per siaj ordonoj kaj malpermesoj super ĉielo kaj tero, tiuokaze oni rapide vivu mallongan rabovivon sur la tero, detruante aliajn kaj sin mem. Sed tiu penso trecege malindas al la homo, kaj ĝi montras, ke la fama aŭtoro, kiu havis ĝin, ankaŭ esence apartenas al tiu malsana pasinto, kiun ni devas venki."

Al la citaĵo de la profesoro mi aldonas alian aserton de Dostojevskij: Se eterna vivo ne ekzistas, moralo kaj morala vivo ne povas ekzisti.

Ĉu tiuj citaĵoj pruvas, ke Dostojevskij estas tia malalta sklavanimo, ke la senco estas, ke ni, se Dio kaj eterna vivo ne ekzistas, devas vivi kiel rabistoj kaj detruantoj?

Dostojevskij havis pensojn, kiujn mi malŝatas, eble li mem parte vivis en ne ŝatinda maniero, iuj el la interparoloj en liaj libroj tedas min. Sed li verkis ankaŭ 1200paĝan senĉesan interparoladon inter diversaj romanfiguroj, en kiu troviĝas nenio superflua, en kiu la verkarto kaj la filozofio atingis la plej altan nivelon, kiun tia verkado iam atingis — laŭ mia kompreno kaj laŭ asertoj de multaj multe pli kompetentaj ol mi. Ĉu li tamen estis tia sklavanimo, tia primitivulo?

La profesoro deziras, ke la homoj rektigu sin kaj mem decidu, kio estas bona kaj malbona. Ĉu tio signifas, ke ĉiu homo arbitre starigu siajn proprajn agadnormojn? Certe ne. Li volas diri, ke la homoj mem kreas la moralon, ke ili devas pensi kaj vivi laŭ tiu fakto kaj ne lasi sin regi de fantazioj pri iu supera estaĵo.

Ĉu de homo aŭ homoj arbitre kreita agadnormo estas moralo, t. e. en la plej alta kaj vasta senco de la vorto? Ankaŭ ne. Diversaj agadnormoj ekzistas, sed la moralo en la plej alta senco povas esti nur unu.

En pensado kaj scienco ni rekonas kiel veron nur tion, kio ĉie kaj ĉiam validas. Du kaj du estis, estas kaj estos kvar ĉie en la universo. Por esti vero, la moralo devas esti same universalvalida. "Agu al aliaj, kiel vi volas, ke ili agu al vi!" Ni demandu al ĉiuj homoj sur la tero, kiuj atingis tian nivelon, ke ili efektive komprenas la senco de tiu frazo: "Ĉu vi trovas tiun normon ĝusta? Ĉu ĝi estas ĉiam kaj ĉie sekvinda?" Nur mensa nenormalulo respondus per ne.

Ne ni kreis tiun normon (kvankam nur per propraj vivosperto kaj medito ĝi fariĝas al ni efektiva vero). Ĝi estas formulita antaŭ jarmiloj, kaj jarmiloj antaŭ tio ĝi certe estis klare sentata. Sed iam ĝi estis nek sentata nek formulita. Ĉu la homoj do kreis tiun veron? Veron oni ne kreas. Oni ne kreis veron, kiam oni eltrovis kaj konstatis la kvalitojn de triangulo, kiam oni eltrovis kaj konstatis, ke io okazanta devas havi kaŭzon. Oni povas eltrovi kaj konstati veron kaj adapti sian vivon al

ĝi. Organizaĵojn ni povas krei, interkonsentojn pri agmanieroj ni povas fari, sed tiuj ne havas universalan validon, se ili ne koincidas kun morala vero.

La formulo de la vero ne signifas, ke oni devas aŭ povas ĉiam laŭvorte adaptiĝi al ĝi. Rekta linio estas la plej mallonga distanco inter du punktoj. Nur escepte havas sencon sekvi la rektan linion, kiam ni movas nin de unu loko al alia. Irante de Svedujo al Aŭstralio mi devus bori truon tra la tero, se mi obstine volus sekvi la rektan linion. Veturante laŭ la tersurfaco mi tamen sekvas la principon de la rekta linio kaj faras tion en la plej bona maniero atingebla. Por laŭvorte sekvi la cititan moralan normon ĉiuj homoj bonstataj, sanaj kaj normale fortaj devus fordoni ĉion sian al malpli bonstataj, forlasi siajn okupojn por helpi malsanajn kaj malfortajn. Tio iam estis la sola maniero — kiun kelkaj sekvis. Sed por la tuta socio troviĝas pli bonaj manieroj sekvi la normon kiel eble plej proksime. Se bandito venas al vi kaj via familio por mortigi, perforti, turmenti kaj rabi, ne havas sencon laŭvorte sekvi la normon. Plej bone oni sekvas ĝin, kiam oni kiel eble plej bone sekvas la principon, kiu la formulo esprimas.

Laŭ tio moralo do estas vero, ne homkreitaĵo. Ĝi estas universala. Dio estas de la vekiĝo de la homa penso la ideo pri la universala, la absoluta. Kiam Raskolnikov mortigis la maljunulinon, li faris tion laŭ arbitra, de li mem farita agadnormo. Dostojevskij konstatis, ke tiel agus la homoj ĉiam, se Dio ne ekzistus, t. e. se ili ne povus rekoni universalajn, absolutajn agadnormojn kaj adapti sin al ili. Ĉu tio estas sklavanimeco, ĉu tio estas banditismo? (Certe, la ideo de Dio entenis por Dostojevskij multe pli ol absolutan moralon. Por la momenta pritrakto tio tamen sufiĉu.)

Kaj la eterna vivo? Kiam ni efektive "komprenas" la moralon, kiam ĝi fariĝas vero same kiel scienca vero, ĝi ne plu estas ordono. Sekvi la veron fariĝas la sola maniero por vivi, agi alie estus same stulte kiel agi kontraŭ iu scienca vero. Homoj pro kaj por la justo prenis, prenas kaj prenos sur sin mizeron kaj malfeliĉon kaj ĉe iras en la morton. Ĉu tio estus ebla, se la ho-

mo estus nur momenta materia procecofenomeno, same kiel flamo, kiu ekflagras kaj poste ne ekzistas? La ideoj de Dio kaj eterna vivo estas variaj kaj konfuzaj kaj dependaj de limigitaj perceptado kaj koneceptado. Sed ili ĉiuj estas esprimo por niaj klopodoj kapti la absoluton, trovi nian lokon en la universala.

Ĉu rezonado kiel la supra havas senceon el "praktika" vidpunkto? Rigardu la nunan homaron!

Lingvaj sugestoj

Pro tio — tial.

Samidcanino demandis min, ĉu ne estas pli bone uzi "tial" ol "pro tio", kiam tio estas ebela. En ŝia klubo oni atentis pri troa uzo de la pli peza esprimo kaj provis eviti ĝin. En Malmö ili aŭdis, ke preskaŭ ĉiuj diras "pro tio". Vole nevole ili imitis la aliajn, kaj la rezulto de ilia lingvoŭleto preskaŭ nuligis. Ĉu ilia vidpunkto tamen ne estas prava? Ĉu ne estas pli bone uzi unu vorton ol du, kiam unu diras la saman kiel du?

Mi ne atentis pri tiu detalo en la lingvouzo kaj ne povas diri, ĉu ili pravas en sia aserto pri troa uzo de "pro tio". Ĉiokaze ŝajnas al mi, ke "tial" estas preferinda, kiam ĝi konvenas. — "Li estas malsana. Pro tio li ne povas veni." Certe "tial" tro bone konvenas tie, same kiel ĉiam, kiam temas pri adverba uzo.

En la konjunkcia uzo "tial ke" apartenas al la zamenhafa lingvo. Mi preferas "pro tio", kaj ŝajne la pli multaj uzas tiun esprimon.

Se "pro tio" estas pli uzata ol "tial", la kaŭzo povas esti parte naciaj esprimmanieroj sed parte ankaŭ la pli granda konkreto de la unua esprimo. Ĝi kvazaŭ rekte montras al la konkreta kaŭzo. Tio signifas grandan esprimvaloron. — La sugesto de niaj samideanoj tamen meritas atenton. "Pro tio" kaj "pro kio" estas sialoke bonaj, sed ni ne forgesu, ke ni ofte povas avantaĝe anstataŭigi ilin per "tial" kaj "kial".

"Unuigitaj" ŝtatoj.

S-ro Cather, Ramleh, Egiptujo: "En n-ro 3/1948 mi legas artikolon, 'Unuigitaj ŝtatoj de Eŭropo'. — Laŭ mia koncepto 'unuigitaj' bildigas ion, kion iu, ekz. Hitler, faris perforte; dum la pli uzata 'unuigitaj' bildigas memvolan kuniĝon. Ŝajnas ke la dana propono estis pri unuigo; tial la nuna 'Unuiginta naciario' efektive estas io nova. — Ĉiokaze estas dezirinda konsentita titolo por la 'Unuigitaj nacioj'."

Laŭ mia impresoj oni pli ofte uzas "unuigitaj" ol "unuigitaj" — ĉu efektive estas tiel, mi ne scias. Logike s-ro Cather kompreneble pravas. La kritikita esprimo tamen estas defendebla: la nacioj unuigas sin. Ili estas unuigitaj ne de pli forta nacio sed de si mem. El sona vidpunkto "unuigitaj" ŝajnas al mi preferinda. Miskomprenon ĝi apenaŭ povas kaŭzi. Kompreneble ni devas en multaj aliaj kazoj uzi la vortojn pli fidele al iliaj senceoj.

Ke ekzistu nur unu nomo por la federacio aŭ unuigo de nacioj, tio estas ne nur dezirinda sed postulinda — same kiel la unuigo aŭ federacio mem.

Majuskloj en derivaĵoj de propraj nomoj.

S-ro Mason Stuttard skribas:

"Leginte la komentariojn pri 'komoj' kaj 'grandaj literoj' en la kuranta numero de MR (2/48) mi sentas deziron fari atenton, sed nur pri la dua afero.

Iuj samideanoj kredas, ke mi uzas majusklojn ĉe derivaĵoj tial ke mi estas Anglo. Tio ne estas vera. Mi pli volonte skribus "angla" precipe pro tio, ke necesas premi ankoraŭ unu klavon sur mia skribmaŝino! Ĉiutaga kontakto kun la lingvouzado tamen montris al mi, ke la uzo de majusklo ĉe tiaj derivaĵoj havas pli ol senceon, ĝi estas necesa.

En la "Trika kaj Kudra Terminaro" de UEA oni vidas, ke iu ŝtofo estas farita el la "lano de Angora kapro". Mi havis la honoron kontroli la manuskripton antaŭ presigo kaj kiam mi legis "angora kapro" mi longe meditita pri la terura tasko trovi kapron, kiu efektive estas "angora" kaj kiel oni povas konstati tiun fenomenon.

Antaŭ kelkaj monatoj mi ricevis leteron en kiu korespondanto parolis pri homo, kiu parolis "senegale". Mi dum kelka tempo cerbumis pri la konstruo, kiu ŝajne ne havis sencon. Nur post tempo mi komprenis, ke li ja parolis "Senegale" ĉar li estis Senegalo.

Iuj amikoj riproĉis min, ke mi "konstruas" tiajn formojn, sed estas absolute vere, ke mi vidis "kuban" ĉapelon kvankam ĝi fakte estis ronda; mi aŭdis pri homo, kiu enamiĝis al "sardino"; mi efektive legis pri "kretaj" montoj, pri "sudanaĵoj" kiuj ne estis moroj de "anoj de la sudo" kaj pri "malta vino" kiu neniel konsistis el malto. Aferoj "esperantaj" estas legoblaj en preskaŭ ĉiuj periodaĵoj, malgraŭ, ke ili tute ne "esperas".

La tendenco en Esperanto estas sekvi la kutimon en la plimulto de lingvoj; la Esperantistoj tamen malatentas la fakton, ke en la naciaj lingvoj tiuj "duplikatoj" ne konfuzas la leganton nek komplikas ka lingvon. Proponi, ke oni uzu grandan literon nur ĉe tiuj formoj, estas vane. Oni ne volas fari tion. Jen la argumento por la majuskloj ĉe derivaĵoj de propraj nomoj." —

Respondo: mia mencio pri majuskloj rilatis ne al la kazo traktita de sro Stuttard, kaj mi eĉ ne pensis pri tiu speciala uzado. Mi diris: "En pasintaj jarcentoj skribantaj homoj ofte uzis grandajn literojn (majusklojn) tute arbitre, kaj ankoraŭ oni povas trovi tion ĉe homoj, kiuj tro malmulte lernis." T. e. oni senprincipe uzis majusklojn, aŭ pro nescio aŭ pro tio, ke oni trovis, ke ili plibeligas la skribon. Kun tia senplana uzo de majuskloj mi komparis la esperantan uzon de apostrofo (en multaj okazoj).

Rilate al la asertoj de sro Stuttard, mia koncepto estas, ke uzo de majuskloj aŭ minuskloj en derivaĵoj de propraj nomoj estas nur lingva kutimo kaj ne pli. En esperanto kelkaj aprobas kaj sekvas la kutimon, kiun subtenas sro Stuttard, aliaj sekvas la alian, kaj al tiuj lastaj apartenas mi.

Sro Stuttard donas la motivojn por sia skribmaniero. Kiuj estas miaj motivoj ne uzi majusklojn en tiaj vortoj?

Unue: mi trovas ilin malplaĉaj el estetika vidpunkto, kiam ili estas tro multaj, same kiel troa intermikso de diversaj literkarakteroj ne estas dezirinda en presaĵo. (Tion oni povas kalkuli

pli malpli subjektiva koncepto.) Due: mi trovas ilin en ĉiuj rilatoj ne necesaj, senutilaj, kaj kio estas senutila ŝajnas al mi neuzinda, eĉ evitinda.

Kiel mi povas konservi tiajn konceptojn kontraŭ la asertoj de sro Stuttard?

Mi demandas: Ĉu sro Stuttard, legante la cititajn esprimojn en ilia kunteksto (ĉar ili ja ne estas konstruitaj), serioze supozas, ke temas pri lano de kapro, kiu angoras, ke negro parolanta senegale estas absurdaĵo, ke kuba ĉapelo signifas kuboforman ĉapelon, ke viro enamiĝis kun fiŝeto, ke malta vino estas farita el malto? Se li serioze respondas jes, mi faras la saman demandon al ĉiuj legantoj.

Tiom da homoj dum tiom da jaroj skribis tiajn vortojn per minuskloj, kaj neniu plendis pri miskompreno krom kelkaj uzantoj de majuskloj. Mi mem ne malmulte skribis en esperanto kaj konsekvence uzis minusklojn. Dum mia tradukado por Sved-Internacia Gazet servo mi skribis sume almenaŭ 700 grandajn libropagaĵojn, kaj temis pri artikoloj, en kiuj tiaj vortoj abundis, kaj vortoj de la tipo kuba, senegala, sudana, kreta efektive estis ne maloftaj. Tiuj novaĵoj iris al ĉiuj partoj de la mondo, kie troviĝis esperantistoj, sed neniu miskomprenis.

Vortoj kiel kreta monto, sudanaĵoj kompreneble estas en si mem malklaraj. Sed kaj en skribo kaj en parolo la fraza vortinterrilato klarigas la sencon. Se ĝi ne klarigas, oni aliformas la frazon. Kiel vi en interparolo povas kompreni, kio estas sudanaĵoj kaj kretaĵoj, (rilataj al Sudano kaj Kreto), kiam vi ne povas percepti la majusklojn? Eĉ se oni parolus pri monto sur Kreto, vi devus, laŭ sro Stuttard, pensi pri monto sur fundamento el kreto. La majusklojn vi nek vidus nek aŭdis.

Sro Stuttard skribas, ke en iuj nacioj oni povas senĝene uzi minusklojn, ĉar ne ekzistas tiaj "duplikatoj", kiaj estiĝas en esperanto. Por ĉiu deko da tiaj "duplikatoj" en esperanto mi povus en la sveda facile kolekti multajn dekojn. Tamen oni ne miskomprenas. Kiam oni serioze parolas kaj skribas, la aŭskultanto aŭ leganto ankaŭ perceptas serioze, kaptas tiun ideon, kiu havas sencon, kaj komprenas laŭ ĝi, ne laŭ la ekbloj por vortludado.

Uzi majusklojn laŭ la motivoj cititaj de sro Stuttard ŝajnas al mi fondi skribregulojn sur vortludado.

Jen mia rezonado. Sed mia rezonado ne signifas, ke sro Stuttard estas malprava en sia uzado de majuskloj. Kiel mi diris: minuskloj aŭ majuskloj en derivaĵoj de propraj nomoj estas lingvaj kutimoj. Mason Stuttard sekvas unu kutimon, mi alian. Kiu el ili iam estos ĝenerale uzata, mi ne scias.

Mi dediĉis tiom da loko al tiu demando, ĉar ĝi havas principan signifon. Mi provis kaj ankoraŭ provas ĝis certa grado unuecigi la lingvon kaj la interpunkcion en MR. Tion oni ja ĝis certa grado faras ankaŭ en seriozaj naciaj revuoj. Sed kion fari, kiam venas sperta kaj lerta esperantisto, kiu en kelkaj rilatoj skribas alie ol laŭ miaj konceptoj kaj ankaŭ donas motivojn por sia maniero? Estus ofendo diri al li, ke li eraras aŭ malpravas, kiam fakte temas nur pri esprimkutimoj, ĝeneralaj aŭ personaj. Mi ne vidas alian eblecon ol permesi al li kaj liaj sampensanoj skribi en ilia maniero kaj ke li permesu al mi kaj miaj sampensanoj skribi en mia maniero.

Oni ne povas fiksi certajn lingvokutimojn per decidoj kaj reguloj. Iu grupo aŭ aŭtoritato kompreneble povas krei regulojn kaj fari decidojn, sed neniu povas devigi eĉ unu solan homon sekvi ilin. Pri la rezulto de la diversaj lingvokutimoj decidos ĉefe la praktiko.

S. Engholm.

Literaturo

LETEROJ DE L.-L. ZAMENHOF. La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Presentado kaj komento de Prof. G. Waringhien. Vol. I. Bindita. 386 paĝoj. Eld. S. A. T. Parizo. Prezo: 3 us. dol. aŭ egalvaloro. Membroj de S. A. T. ĝuas rabaton de 20 %.

En sia fama "Letero pri la deveno de Esperanto" Zamenhof rakontis, kiamaniere li interesiĝis pri la problemoj de Lingvo Internacia. La esperantistoj ĝenerale trovis en liaj informoj

kontentigan respondon al la demando, kio instigis Zamenhof krei sian lingvon: la intergenta malamo en Bjelostoko, la urbo de lia naskiĝo. Ruzaj samideanoj poste malkovris, ke "nature" Esperanto *devis* naskiĝi en lando kia Polujo, kie la diverslingveco estis multpeza malfeliĉo por ĉiuj loĝantoj. Zamenhof mem plurloke emfazis, ke la medio gravege influis lian vivon.

"Se mi ne estus hebreo el la ghetto, la ideo pri la unuiĝo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon, aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo. La malfeliĉon de la homara disiĝo neniu povas senti tiel forte, kiel hebreo el la ghetto." P. 107.

"Nature" tamen estis, ke al ĉiu normala judo, kiel ankaŭ al ĉiu normala ruso, polo kaj germano en Bjelostoko la juda respektive la rusa, pola kaj germana medio — kun sia kulturo, kredo kaj moroj, sed ankaŭ kun siaj klaĉoj kaj antaŭjuĝoj — diktis pri vivo kaj vivperceptoj. La medio diktis ankaŭ pri konduto kaj sinteno kontraŭ fremduloj. "Natura" estas ĝuste la intergenta malamo, eĉ — en tiu tempo — la pogromoj kaj stratbataloj estis "naturaj". Ĉu vi sentas nun kia granda homo estis Zamenhof? Vi devas legi liajn leterojn tre atente kaj explore; vi devas foje plenigi tiujn lokojn, kiujn la preskaŭ troa modesteco de Zamenhof lasis neskribitaj.

Mi volas ankoraŭ resti unu minuton en Bjelostoko. Anekdoto rakontas, ke iam ĝia kvargenta loĝantaro disputis pri la supereco de la naciaj lingvoj. "Kiel vi diras 'akvo'?" demandis germano. Post kiam ruso, hebreo kaj polo estis dirintaj la vorton akvo en sia lingvo, la germano triumfe elkriis: "Wir aber nennen es Wasser und es ist auch Wasser!" La germano ne komprenis, ke homo efektive povas imagi *veran* akvon, aŭdante alian vorton ol Wasser. Ne moku lin! Klopodu serioze rilatigi la anekdoton al religiaj, moralaĵaj, politikaj kaj similaj aferoj! Unu ekzempla demando: Ĉu vi povas senpene imagi, ke homo efektive perceptas la Veron per alia kredo aŭ konvinko ol la via? Zamenhof liberigis sin el tiu Spirita Ghetto, en kiu ni ĉiuj troviĝas! tio estas tiom pli rimarkinda ĝuste ĉar Zamenhof estis judo. Eĉ la plej evoluinta homo facile fariĝas ŝovinisto, se li estas tiel kruele atakata.

"Se mi ne estus hebreo, tiam mi povus min fordoni al mia

revo *tute* kaj *absolute*; sed ĉar mi apartenas al popolo, kiu tiom multe suferadis kaj plejparte ankoraŭ nun terure suferas (precipe en Rusujo, kie la konstantaj ĝemoj de mia malfeliĉa, terure premogata kaj kalumniata popolo venenas al mi la vivon), tial tre ofte turmentadis min la penso, ke mi ne havas la moralan rajton laboradi por idealoj neŭtrale homaj, kiam mia popolo tiom multe suferas kaj havas por si tiom malmulte da batalantoj". (P. 108.) El kio konsistas tiu sinliberigo de Zamenhof? El la rekono de tre simpla principo, sed nur spirite matura kaj evoluinta homo kun forta sento por la esenca en la vivo povas tiel plene asimili ĝin kiel Zamenhof.

"La sola *leĝo*, kiun donis al ni la mistera morala Forto reganta la mondon, estas: — agu kun aliaj tiel, kiel Vi deziras, ke oni agu kun Vi —; ĉio alia en la religioj estas nur *moroj*, kiujn kreis la *homoj* kaj kiujn observi ni *povas*, sed ne *devas*." (P. 202.)

La Homaranismo jam vekis multajn diskutojn. Sed neniu leganto de *Leteroj de Z.* (pluraj el ili obligas al ni preskaŭ persone konatiĝi kun la aŭtoro!) evitos eksenti, ke Z. rigardis la vivon de sublime alta vidpunkto. La esperantistoj en sia komuna serĉado de vivosenco konscie aŭ nekonscie transprenis liajn principojn kaj vivperceptojn kaj ĝuste tio estis por la movado sortograva ankaŭ kaj precipe en la danĝera periodo de la Idokrizo. Prof. Waringhien ne povis ne rimarki tion, sed kial li "komentas" tiel ironic, se ne diri sarkasme?

"... la unua (favora fakto) estis la disvolviĝo, inter la esperantistoj, de la mistiko pri la "Interna Ideo", bazita sur la homamo, kun pacisma, internaciisma kaj religieca nuancoj. Iniciatita de Zamenhof mem, ĝi plene ekfloris dank' al ĉiujaraj kongresoj, kies sentotuŝaj, korckseitaj ceremonioj potence allogis la "samidecanaron" kaj nutradis en la freŝbakitaj esperantistoj neracian alligitecon al la "Afero". (P. 3—4.) Certe oni povas kun tia tono kaj kun simila vortelekto karakterizi ĉe nun parton kaj de la neŭtrala kaj de la laborista(!) movado, sed kiel karakterizo ĝenerala ĝi ne taŭgas, ĉe se ni ne konsideras la nepre elsarkindan "Iniciatita de Zamenhof mem". Mi trovis pli da tiaj plumglitoj en la Prologo. "La eltrovinto de la dinamito, terurita de la detrupovo de lia eta eksplodaĵo, pente tes-

tamentis kapitalon por rekompenci la plej grandajn bonfartontojn de la homaro: la Nobelpremioj... (P. I.) Tiu frazo montras, ke Prof. Waringhien nenion scias pri la geniulo Nobel. Miajn amikojn en Parizo eble interesas, ke li estis vera kosmopolito, se ne sennaciulo.

El historia vidpunkto la nova libro, kiu enhavas tre gravajn, esencajn dokumentojn, estas revelacia. Ĝi klarigas aferojn, kiuj restis ĝis nun iom nebulaj (la kontrakto kun Hachette), sur aliajn ĝi ĵetas tute novan lumon (la Idoskismo). La vera iniciatinto de tiu skismo estis Dr. Javal, samrasano kaj samprofesiano de Zamenhof. Javal deziris reformi la alfabeton (ĉapelitaj literoj lacigus la okulojn). Zamenhof, fidela al la principo de lingva kontinueco, ne akceptis liajn dezirojn. Dum la unua kongreso (pri kiu la leganto trovos multajn interesajn informojn!) Zamenhof loĝis ĉe Javal kaj inter ambaŭ noblanimaj viroj kreskis intima kaj varma amikeco. Z. komencas konsideri la enkondukon de plibonigoj per la vojo de neologismoj.

Intertempe Javal konatiĝis kun Lemaire. Kune ili sendas al Z. projekton de reformoj. Z. veturis Bruselon kaj Parizon por diskuti ĝin kun L. kaj J., kiu lasta proponis al li kvaronmilionon da oraj frankoj, se li akceptos. Z. rifuzis kaj la projekton kaj la monon. En 1907 Javal turnis sin al Couturat, kiu volonte konsentis helpi lin en la reforma agitado kaj senskrupule akceptis ankaŭ la monon. Couturat estis la gvidanto de la fama Delegacio por alpreni de L. I. kaj la vera patro de Ido.

Estas tute neeble doni en recenzo ĉe nur palan imagon pri la atentokaptaj kaj riĉinformaj leteroj kaj dokumentoj. Sed ni ne scias, ĉu la modernaj esperantistoj (inter kiuj ĉe tre spertaj estas preskaŭ barbaroj rilate al la pli frua historio de lingvo kaj movado) povos sen granda ĝeno sekvi la iradon kaj evoluon de la historiaj okazaĵoj. Diversaj aludoj al faktoj konataj nur de informitaj esperantistoj certe ne donas la ĝustajn impresojn kaj komprenon. Pli utila ol referencoj al la elĉerpita Originala Verkaro kaj biografia listo de gazetoj, libroj kaj broŝuroj pli parte ne plu akireblaj estus la enkompono de kontinua historia skizo, ĉe kun tiuj fundamentaj detaloj, kiujn esperantisto propre devus jam scii. Sed verŝajne la libro fariĝus tro ampleksa? Ce-

tere la fragmentoj estas tiel interesaj kaj plurloke ankaŭ tragi-
kaj kaj sentotuŝaj, ke ili profunde impresos ĉiujn legantojn. Ili
povos ricevi bonan imagon pri la koncerna periodo kaj ankaŭ
pri la malfacila, ideofidela vivo de la Majstro. La du volumoj
entenas ĉirkaŭ 260 leterojn de Z. ĝis nun neeldonitajn. Valorega
plirriĉigo de la Z-a literaturo! Se la prologo estis nesukcesa
(ankaŭ en sia plej grava pretendo: prezenti la tempomedion),
la komentojn oni legos kun plezuro kaj profito. Aspekto, preso
kaj tipografia aranĝo estas tre bonaj. Laŭdon al la kompilinto
kaj al S. A. T.!

L. C. Deij.

J. C. Heer: Ĉe la sanktaj akvoj, dua parto.
Trad. A. Bader, P. le Brun, J. Schmid.
Prezo svisaj fr. 3,05.

La unua parto priskribis, kiel montara vilaĝeto preskaŭ ekster
la mondo transiras de netuŝita izoleco al la maltrankvilo kaj
rapidemo de la moderna tempo. En la dua volumo ni vidas kva-
zaŭ de proksime kiel la vilaĝanaro konfuziĝas pro la perforte
truditaj idcoj, tiom fremdaj al la intimaj moroj kaj kutimoj.
Malica idioto malbonuzas la popolajn suspektojn, kaj kiam
aldone hazarda plektiĝo de okazaĵoj (kaŝita murdo) vekas ĉe
la trankvilaj homoj praaajn instinktojn kaj superstiĉojn, tiam
okazas en la naturproksima montara lando terura tragedio.
Interesa libro kun multaj streĉaj situacioj. Oni vidu ankaŭ la
recenzon en Mr. 1/48. Bona kaj flua lingvo; klara preso; bona
papero. Rekomendinda.

L. C. Deij.

Urbo Sao Paulo.
Eld: Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko,
Rio de Janeiro.

Bela, interesa kaj instrua bildlibro pri la urbo Sao Paulo,
eldonita honore al la XIa brazila esperantokongreso, kiu okazis
tie. Ricevebla de la supra adreso.

Nuntempa Pollando.
Eld: Asocio de Esperantistoj en Pollando,
Marszalkowska 81/32, Varsovio.

Ilustrita kaj agrable presita libreto pri la nova Polujo. La
enhavo informas pri la strukturo de la pola ŝtato, pri ekster-
landa politiko, klerigo, rekonstruado, profesiaj unuigoj, ekono-
mio, kooperativa movado, esperanta movado.

Faktoj pri Danlando.
Eld: La tagjurnalo Politiken, Kopenhago.
Mendebla ĉe Libroservo de Centra Dana Esperantista
Ligo, Pr. Jørgengade 4 A, 2, Kopenhago N, Danujo.
Prezo: en Danujo 2,50 dkr, eksterlande 3 dkr.

Jen tre praktika, interesa kaj utila informlibro pri Danujo.
Multe da bildoj, diagramoj, artikoloj kaj statistiko en tre
agrabla formo donas ĉiuf flankan informadon pri Danujo: pri
historio, lando kaj popolo, konstitucio, loka administrado, sociaj
aranĝoj, edukado, terkulturo, industrio, ŝiptrafiko. Troviĝas
ankaŭ resumo pri la plej eminentaj danoj en ĉiuj kampoj de
la kultura vivo. Tia libro apartenas al la plej prudenta utiligo
de esperanto. Ke la esperantistoj komprenu ankaŭ valorigi tiun
utiligon. Nepre havigu la libron.

Ludovic-Rodo: Vivo de Pissarro.
Agostinho de Silva: Pro tri pingvenaj ovoĵ.
Eld: Portugala Eldona Rondo.

Du novaj kajeroj en la konata serio. La unua estas esperanta
originalo, la dua traduko (de Manuel de Freitas). Ambaŭ estas
bonaj kaj legindaj. La rakonto pri la ekspedicio por la ping-
venaj ovoĵ estas ege streĉa, kulmino de epika rakontado.

*

La Juna Vivo. — MR ricevis por mencio tri malnovajn jar-
kolektojn de la junulara revuo *La Juna Vivo*: de 1934—35,
35—36, 36—37. Ili estas binditaj, kun kartona kovrilo. La prezo
estas po 5 rpk aŭ egalvaloro, inkl. afrankon. Mendeblaj ĉe Sno
E. v. Veenendaal-Bouwens, LIMMIEN (NH), Nederlando. (Ankaŭ
ĉe landaj perantoj de *La Vivo*.) Mi kun ĝojo rekomendas ilin.

Ili estas malkaraj kaj ili donas interesan kaj valoran legaĵon tre konvenan por komencantoj kaj progresantoj.

*

Ankoraŭfoje pri Klavarskribo. La firmo Klavarskribo sendis al MR komenton pri la recenzo en n-ro 4/18. — "Klavarskribo (diras s-ro v. der Stempel) estas ne muzikskribo. Ĝi estas instrumentskribo." Fakte klavarskribo estas ambaŭ samtempe. Unue ĝi estas idcala muzikskribo, por ĉiuj instrumentoj, por kanto kaj por teoriaj celoj; kaj krome ĝi estas instrumentskribo. Klavarskribo do indikas la sonojn kaj ankaŭ la harmoniajn valorojn multe pli bone, pli klare, pli ĝuste kaj pli konsekvence ol la malnova muzikskribo. Ankaŭ (sed duarange) ĝi rekte indikas la ludotajn klavojn por klavarinstrumentoj, la moviĝon de la arĉo por arĉinstrumentoj. — Precipe la funkcio de "instrumentskribo" interesas la grandan amason de diletantoj, kaj ĝi fakte estas vera savo por ili. Sed tio ne forigas, ke Klavarskribo kiel "muzikskribo" estas vera savo ankaŭ por serioza kaj profesia muzikstudado. — Multilate Klavarskribo estas en sama pozicio kiel esperanto. Ĉiu esperantisto konas personojn, kiuj diras: "Esperanto sufiĉas por ordinara komunikado sed ne laŭgas por literaturo." Neniu povas motivi tiun opinion, kaj la skeptikuloj (manko de sufiĉa scio de esperanto) maŝine ripetas unu laŭ alia. — Muzikscienculoj kiel Schönberg, Hindemith, Serieyx kaj multaj aliaj pruvis jam antaŭ longe, ke la malnova skribo estas multe pli erarigaĵo ol helpo por la muzikteorio. — Volonte la Instituto Klavarskribo, Slikkerveer, Nederlando, informas ĉiun pri literaturo pri la temo. La instituto volontas ankaŭ sendos ekzemplaron de partituro, kiu pruvos, ke la nova muzikskribo estas la sama por ĉiuj instrumentoj, ke partituro ne estas volumena, kaj ke ĝi estas pli facile supervidebla, precipe la harmonioj. — Klavarskribo ne estas helprimedo por diletantoj, sed ĝi estas scienca solvo de la problemo de muziknotado. Ĝi jam estas uzata de centmiloj en diversaj landoj, kaj la tuta muzikliteraturo (escepte tre malmultkonatajn muzikaĵojn) estas jam eldonita en la nova muzikskribo; pli ol 9.000 eldonoj inter kiuj multnombraj binditaj volumoj."

Por diskuto

Tiu ĉi art. pli konvenus en naciaj esp. gazetoj. Ĝia principa demando tamen meritas atenton ankaŭ ekster la grupaj medioj.

Red.

La diskuto komencis per kelkaj demandoj de malofta klubvizitanto. "Kial ni ne pli ofte aranĝas festojn por la kursanoj? Kial ne ĉiuj kursanoj aliĝas al la klubo?"

Mi ne kredas, ke ni povas gajni kaj konservi membrojn nur per festoj. Grandaj, vi glaj societoj politikaj, junulaj ktp pli bone kapablas kaj komprenas aranĝi tiajn kunvenojn. Estus vane konkuri kun ili. Niaj viglaj esperantistoj jam havas sufiĉe da laboro: kursgvidado, korespondo, estraraj taskoj. Restas malmulte da tempo por aranĝi festojn.

Fakte ne decas logi la homojn per nura amuzado. Nia movado ne estas tia. Kiel prave diris alia klubano: "Ni devas serĉi aliajn vojojn. Ni donu al la homoj tion, kion ili ne povas trovi aliloke." Sed, sed... Kiom da esperantistoj, almenaŭ en nia urbo, havas ion por doni aŭ komprenas kiel doni?

La stato estas tia, ke la studgvidantoj ne volonte invitas la kursanojn al niaj klubkunvenoj. Ili hontas. Jes, mi kredas tion, kaj ili pravas laŭ mi. Nun vi rajtas demandi: "Kial vi mem iras al la klubkunvenoj?" Nu, mi apartenas al la estraro, al tiuj netaŭguloj, kiuj ne povas sufiĉe amuzi la homojn.

Mi mem ne havas bezonon de festoj, ĉar Esperanto donas al mi sufiĉe sen festoj. Mi ĝuas la studadon kaj instruadon de la lingvo, kaj mi havas amikon korespondon kun multaj esperantistoj. Estas por mi la plej ĝuinda parto de la tago, kiam ni legas interesan esperantoartikolon aŭ P. V.

Sed diri tion al amuzemuloj tute ne decas, ĉu? Ĉar ili neniam lernos sufiĉe por povi senpene uzi la lingvon. Ke persono, kiu komencas la esperantostudadon pro nura lingva intereso, kiel mi mem, iom post iom estas kaptata de la Esperantismo, la interna ideo, tio ŝajnas al mi neevitebla. Sed kiel montri la ĝustan vojon al tiu stato al esperantistoj, kiuj volas nek legi nek korespondi? Mi ne povas.

Vi certe pensas, ke mi estas pesimisto tiurilate. Jes, pesimista mi estas kaj estos, ĝis mi aŭ vi trovos taŭgan rimedon por allogi la klubanojn kaj kursanojn kaj konservi ilin por la esperantomovado.

Gunhild Tistad.

KOREKTU en MR n-ro 4/48:

- P. 18, lin. 13 de mals. — de = da.
" " 17 " " — antentigis = atentigis.
21, " 17 — kromlinioj = kromsignoj.

"ESPERANTO-PRESS"

Kvankam tiu ĉi internacia informa servo, kies sidejo troviĝas en Zŭrich (Svislando), tute similas al la konataj gazetar-agentejoj, ĝi tamen ne egalas al ili, ĉar ĝi uzas nur unu solan lingvon, nome Esperanton. Per tiu arango ĝi feliĉe solvis la lingvan problemon, kiu tiom malfaciligas la internacian vivon.

La "Svisa Bulteno" de Esperanto-Press diskonigas en la tuta mondo informojn pri la komerco, la industrio, la turismo kaj la kultura vivo de Svislando. Aliaj bultenoj aperas kun informoj pri aliaj landoj, ekzemple pri Brazilo, tiel, ke "Esperanto-Press" estas vere internacia entrepreno. Per la uzado de Esperanto kiel sola lingvo, ĝi plisimpligas sian korespondadon al minimumo kaj tamen atingas la tutan mondon, ĉar Esperanto ja estas bone konata en ĉiuj landoj de la tero. Tion pruvas, cetero, la "Esperanto-Asocio de la Journalistoj", kiu fondiĝis antaŭ nelonge en Götėborg (Svedio) kaj al kiu tuj aliĝis redaktoroj kaj ĵurnalistoj en 32 diversaj landoj.

La graveco de tiu informa servo "per Esperanto" estas substre-kita je la fakto, ke ĝi estas oficiale rajtigita havi specialan reprezentanton ĉe la Informa Centro de la Unuigitaj Nacioj en Genevo. Por la unua fojo la tutmonda gazetaro ricevas nun informojn "pere de Esperanto" pri la grandaj internaciaj konferencoj, kiuj provas rekonstrui Eŭropon kaj pacigi la mondon. En la servo de la inter-nacia gazetaro Esperanto fariĝis do fakto tute atentinda.

"ESPERANTO-PRESS"
Mühlebachstrasse 47
Zŭrich 32, Svislando.

Pro multa laboro en la presejo tiu ĉi n-ro malfruiĝis. La le-gantoj afable pardonu.

La nroj 3/46, 4/46, 1/47-4/47 estas ankoraŭ haveblaj por duona prezo. La ĵarkolekto 1948 ankoraŭ havebla.